


# BEKDU enhavo

<u>paĝo</u>	<u>enhavo</u>	<u>metodo de praktikado</u>
1	rilataj pronomoj: kiu, kiuj	valencia metodo
2	rilataj pronomoj: kiun, kiujn	valencia metodo
3	rilataj pronomoj: kiu(n), kiuj(n)	valencia metodo
3a	pridemandado	valencia metodo +
4	rilataj pronomoj: kiu(n), kiuj(n)	valencia metodo
5	kies	valencia metodo
6	t-vortoj	valencia metodo
7	tiu(j)(n), kiu(j)(n)	valencia metodo
8	t-vortoj	valencia metodo +
9	i-vortoj, n-vortoj	valencia metodo
10	bildo	
10a	Dialogetoj	dialogo
11	si, sin, prep + si	klarigado
12	si, sin, prep + si	skribekzerco + valencia metodo +
13	prepozicio + kio, kiu, kiuj	valencia metodo +
14	por, por + i	valencia metodo +
15	komparacio	klarigado
16	komparacio	valencia metodo
16a	komparacio	valencia metodo
17	se + -us	valencia metodo +
17a	por + i, por, ke + u	skribekzerco
18	plaĉas, ŝatas, -as, -us	valencia metodo +
19	ofteco	klarigado
20	ofteco	valencia metodo +
21	repaso	valencia metodo +
22	tabelvortoj	klarigado
23	rilatpronomo: kie	valencia metodo +
24	prepozicio + kiu(j) + o(j)	valencia metodo +
25	+n = prep + o = +e	skribekzerco
26	repaso: tempordo	parolekzerco
27	rilatpronomo: prep + kiu(j)	valencia metodo +
28	BEKDU repasado	valencia metodo +

Vi lernos, kaj praktikos

Rilataj Subpropozicioj  
kiu, kiuj





- 1 Ĉu la domo, kiu estas sur la maldekstra monto, estas granda?
- 2 Ĉu la domo, kiu estas sur la dekstra monto, estas malgranda?
- 3 Ĉu la arboj, kiuj staras antaŭ la granda domo, estas malaltaj?
- 4 Ĉu la arboj, kiuj staras malantaŭ la granda domo, estas malaltaj?
- 5 Kiaj ili estas?
  
- 6 Ĉu la birdoj, kiuj flugas super la alta monto, estas malgrandaj?
- 7 Ĉu la birdoj, kiuj flugas super la alta monto, estas grandaj?
- 8 Ĉu la arbo, kiu staras dekstre de la domo, estas malalta?
- 9 Kia estas la arbo, kiu staras dekstre de la domo?
  
- 10 Kiaj estas la arboj, kiuj staras malantaŭ la domo?
- 11 Ĉu la birdoj, kiuj flugas super la granda domo, estas grandaj?
- 12 Kiaj estas la birdoj, kiuj flugas super la granda domo?
- 13 Ĉu la fenestro, kiu estas en la malgranda domo, estas larĝa?
- 14 Kia estas la fenestro en la malgranda domo?
  
- 15 Kie estas la arboj, kiuj estas altaj kaj grandaj?
- 16 Ĉu la kato, kiu kuŝas apud la alta arbo, estas granda kaj blanka?
- 17 Kia estas la kato, kiu kuŝas maldekstre de la granda domo?
- 18 Kiaj estas la domoj?
- 19 Kie ili estas?
  
- 20 Kiaj estas la birdoj?
- 21 Kiaj estas la fenestroj?
- 22 Kiaj estas la katoj?
- 23 Kiaj estas la arboj?

Bonvolu ne forgesi ripeti la paĝon!  
Dankon!

Vi lernos, kaj praktikos

Rilataj Subpropozicioj II  
kiun, kiujn



- 1 Ĉu la libro, kiun Julio legas, estas granda?
- 2 Ĉu la libro, kiun Ludoviko legas, estas granda?
- 3 Ĉu la libro, kiun Ludoviko legas, estas granda aŭ malgranda?
- 4 Kia estas la libro, kiun Julio legas?
  
- 5 Kia estas la libro, kiun Ludoviko legas?
- 6 Kiaj estas la libroj?
- 7 Ĉu la panoj, kiujn Ramono bakis, estas longaj?
- 8 Ĉu la panoj, kiujn Paŭlo bakis, estas longaj?
  
- 9 Kiaj estas la panoj, kiujn Paŭlo bakis?
- 10 Kiaj estas la panoj, kiujn Ramono bakis?
- 11 Ĉu vi vidas la panojn, kiujn Paŭlo kaj Ramono bakis?
- 12 Kiaj la panoj estas?
  
- 13 Ĉu vi vidas la ĉapelojn, kiujn la bakistoj surhavas?
- 14 Ĉu la ĉapelo, kiun Paŭlo surhavas, estas malalta?
- 15 Kia estas la ĉapelo, kiun Ramono surhavas?
- 16 Kiaj estas la ĉapeloj?
  
- 17 Ĉu la libro, kiu estas en la manoj de Julio, estas granda?
- 18 Ĉu la libro, kiu estas en la manoj de Ludoviko, estas granda?
- 19 Kia estas la libro, kiun Ludoviko havas?
- 20 Ĉu la panoj, kiuj estas antaŭ Paŭlo, estas longaj?
  
- 21 Ĉu la ĉapelo, kiu estas sur la kapo de Ramono, estas alta?
- 22 Kia estas la ĉapelo, kiun li surhavas?
- 23 Kiaj estas la libroj?
- 24 Bonvolu refari la demandoliston. Vi parolos pli kaj pli flue.

Vi lernos, kaj praktikos


Rilataj Subpropozicioj III



- 1 Ĉu la arbo, kiun Marko hakas, estas alta?
- 2 Ĉu la arbo, kiun Pako hakas, estas alta?
- 3 Kia estas la arbo, kiun Pako hakas?
- 4 Ĉu la hakilo, kiun Marko uzas, estas malgranda?
- 5 Ĉu la hakilo, kiun Pako uzas, estas malgranda?
- 6 Kia estas la hakilo, kiun Pako uzas?
- 7 Kiaj estas la hakiloj, kiujn Marko kaj Pako uzas?
- 8 Kiaj estas la arboj, kiujn ili hakas?
- 9 Ĉu Pablo kaj Leopoldo levas pezilojn?
- 10 Ĉu la peziloj, kiujn Pablo levas, estas pezaj?
- 11 Ĉu la peziloj, kiujn Leopoldo levas, estas tre pezaj?
- 12 Kiaj estas la peziloj, kiujn Leopoldo levas?
- 13 Kiel nomiĝas la persono, kiu levas la pezajn pezilojn?
- 14 Kiel nomiĝas la persono, kiu levas la malpezajn pezilojn?
- 15 Ĉu la peziloj, kiuj estas super Leopoldo, estas pezaj?
- 16 Kiaj estas la peziloj, kiuj estas super Leopoldo?
- 17 Kiel nomiĝas la persono, kiu hakas la altan arbon?
- 18 Kiu estas tiu persono, kiu hakas la malaltan arbon?
- 19 Kiaj la arboj estas?
- 20 Ĉu la hakilo, kiu estas en la manoj de Marko, estas granda?
- 21 Kiaj estas la hakiloj, kiujn Marko kaj Pako havas?
- 22 Kiuj estas tiuj, kiuj levas la pezilojn?
- 23 Kiaj estas la peziloj?
- 24 Bonvolu ripeti la paĝon, kaj ne legi la respondojn. Parolu pli kaj pli flue kaj bone!

Vi lernos, kaj praktikos

Rilataj Subpropozicioj IV



- 1 Ĉu la vino, kiun Arturo trinkas, estas bona?
- 2 Ĉu la vino, kiun Alberto trinkas, estas bona?
- 3 Kia estas la vino, kiun Alberto trinkas?
- 4 Kia estas la vino, kiun Arturo trinkas?
  
- 5 Kiel fartas Arturo kaj Alberto?
- 6 Kiaj estas la vinoj, kiujn Alberto kaj Arturo trinkas?
- 7 Ĉu la personoj, kiuj pakis la valizojn, nomiĝas Viktoria kaj Elizabeta?
- 8 Kiel nomiĝas la personoj, kiuj pakis la valizojn?
  
- 9 Ĉu la virino, kiu pakis la grandajn valizojn, nomiĝas Ana?
- 10 Kiu estas la persono, kiu pakis la grandajn valizojn?
- 11 Ĉu la valizoj, kiujn Ana pakis, estas grandaj?
- 12 Kiaj estas la valizoj, kiujn Ana pakis?
  
- 13 Ĉu la valizoj, kiujn Maria havas, iros al Moskvo?
- 14 Kien iros la valizoj, kiuj estas kun Maria?
- 15 Kien iros la valizoj, kiujn Ana pakis?
- 16 Bonvolu diri al mi, kiaj la valizoj estas.
  
- 17 Ĉu la virino, kiu iros al Romo, nomiĝas Ana?
- 18 Ĉu vi scias, kiel nomiĝas la virino, kiu iros al Moskvo?
- 19 Ĉu vi vidas la personon, kiu pakis la malgrandajn valizojn, kaj kiu iros al Novjorko?
- 20 Ĉu la valizoj, kiujn Maria kaj Ana pakis, iros al Novjorko kaj al Parizo, aŭ al Moskvo kaj al Romo?

---

Vi lernos, kaj praktikos

KIES

---

- 1 Kies pantolono estas \_\_\_\_\_ ? (blanka, blua, bruna, . . . ktp.)
- 2 Kies ĉemizo estas \_\_\_\_\_ ?
- 3 Kies ŝuoj estas \_\_\_\_\_ ?
  
- 4 Kies hararo estas \_\_\_\_\_ ? (blonda, bruna, griza . . . ktp)
- 5 Kies okuloj estas \_\_\_\_\_ ?
- 6 Kies estas \_\_\_\_\_ ? (tiu libro, tiuj paperoj. . . ktp)
  
- 7 Kiel nomiĝas la persono, kies hararo estas \_\_\_\_\_ (blonda, bruna . . . ), kaj \_\_\_\_\_ (longa, friza, rekta. . . ktp)?
- 8 Bonvolu diri al mi, kiel nomiĝas la persono, kies \_\_\_\_\_ (libro, mansako, jako . . . ktp) estas sur la tablo.
- 9 Ĉu vi scias, kiel nomiĝas la lernanto, kies libron la instruisto metis sur la tablon?
  
- 10 Kiel nomiĝas la lernanto, kies paperojn la instruisto metis sub la tablon?
- 11 Ĉu al vi plaĉas la persono, kies ĉemizo estas \_\_\_\_\_ ?
- 12 Kion faras nun la lernantino, kies hararo estas \_\_\_\_\_ ?

Vi lernos, kaj praktikos



K => T

- |  |   |
|--|---|
| <p>1 Kie</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>◦ estas la <u>plafono</u>?</li> <li>◦ estas la <u>planko</u>?</li> <li>◦ estas la pordo(j)?</li> <li>◦ la instruisto estas?</li> <li>◦ estas mia skribilo?</li> <li>◦ vi loĝas?</li> <li>◦ _____?</li> <li>◦ _____?</li> <li>◦ _____?</li> </ul> | <p>5 Kiam</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>◦ nia kurso komenciĝas?</li> <li>◦ nia kurso finiĝas?</li> <li>◦ vi vekigis hodiaŭ?</li> </ul>   |
| <p>2 Kiu(j)(n)</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>◦ estas la instruisto?</li> <li>◦ estas la lernantino(j)?</li> <li>◦ estas la lernanto(j)?</li> <li>◦ nomiĝas _____?</li> <li>◦ mi montras?</li> <li>◦ mi tuŝas?</li> </ul>  | <p>6 Kia(j)(n)</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>◦ estas elefanto?</li> <li>◦ estas ĝirafoj?</li> <li>◦ muŝoj estas?</li> <li>◦ la suno estas?</li> <li>◦ ŝuojn vi havas <u>hejme</u>?</li> <li>◦ valizon havas vi?</li> </ul>   |
| <p>3 Kio(n)</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>◦ estas ruĝa?</li> <li>◦ estas <u>malmultekosta</u>?</li> <li>◦ <u>multekosta</u> estas?</li> <li>◦ estas via?</li> <li>◦ mia estas?</li> <li>◦ estas ronda kaj verda?</li> <li>◦ mi posedas?</li> <li>◦ posedas vi?</li> </ul>               | <p>7 Kies</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>◦ ĉemizo estas _____?</li> <li>◦ ŝuoj estas _____?</li> <li>◦ <u>hararo</u> estas longa?</li> <li>◦ nomo estas _____?</li> <li>◦ estas tio?</li> <li>◦ estas tio kaj tio?</li> <li>◦ estas tiu libro?</li> <li>◦ paperojn mi tuŝas?</li> </ul>                   |
| <p>4 Kiom (da)</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>◦ personoj loĝas en Novjorko?</li> <li>◦ personoj loĝas en via hejmurbo?</li> <li>◦ instruistoj estas en nia kurso de Esperanto?</li> <li>◦ gelernantoj parolas nun?</li> <li>◦ kostas bileto por aŭtobuso?</li> </ul>                     | <p>8 Kiel</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>◦ flugas muŝo?</li> <li>◦ flugas birdo?</li> <li>◦ flugas aviadilo?</li> <li>◦ <u>oni</u> manĝas fiŝon?</li> <li>◦ supon oni manĝas?</li> <li>◦ oni <u>ŝlosas</u> pordon?</li> <li>◦ oni <u>viŝas</u> teleron?</li> <li>◦ oni <u>rompas</u> krajonon?</li> </ul> |
|  | <p>9 Bonvolu ripeti la ekzercon, sed ĉi foje, ne faru tion laŭorde, sed senorde. Dankegon!</p>  |

Vi lernos, kaj praktikos


Rilataj Subpropozicioj V  
tiu(j)(n), kiu(j)(n)

- 1 Ĉu la lando, kiun la instruisto montras, estas granda?
- 2 Ĉu la landoj, kiujn montras la instruistino, grandaj estas?
- 3 Kia estas la lando, kiun la instruisto montras, kaj kiaj estas tiuj, kiujn la instruistino montras?
- 4 Ĉu la pluvombrelo, kiun Mipi tenas, estas granda?
- 5 Bonvolu diri al mi, kia estas tiu, kiun tenas Mupi.
- 6 Diru al mi, ĉu la floroj, kiuj estas en la manoj de Mipi, estas grandaj aŭ malgrandaj.
- 7 Ĉu vi scias, kiaj estas tiuj, kiujn Mupi tenas?
- 8 Rigardu la pluvombrelojn. Priskribu tiun, kiun Mipi tenas, kaj tiun, kiun Mupi tenas.
- 9 Nun rigardu la landojn. Parolu pri tiu, kiun la instruisto montras, kaj parolu pri tiuj, kiujn la instruistino montras.
- 10 Rigardu la florojn. Priskribu tiujn, kiuj estas en la mano de Mipi, kaj parolu pri tiuj, kiujn Mipi havas en la mano.
- 11 Ĉu vi pensas, ke Mipi loĝas en la lando, kiun la instruisto montras?
- 12 Kiu loĝas en la lando, kiun montras la instruisto?
- 13 Ĉu vi scias, kiuj loĝas en la landoj, kiujn la instruistino montras?
- 14 Ĉu vi povas diri al mi, kiom da personoj loĝas en la lando, kiun la instruisto rigardas?
- 15 Ĉu vi kredas, ke la floroj, kiujn Mipi havas, estas por la instruisto?
- 16 Bonvolu diri al mi, ĉu la pluvombrelo, kiun Mipi tenas estas granda, kaj ĉu la floroj, kiujn Mipi tenas estas ruĝaj.





Vi lernos, kaj praktikos



- 1 Ĉu Londono estas en Francio?
- 2 Ĉu nia kurso estas en la strato Zamenhof?
- 3 Ĉu elefanto estas malgranda?
- 4 Ĉu muŝoj estas grandaj?
  
- 5 Ĉu Esperanto havas malfacilan gramatikon?
- 6 Ĉu vi havas ruĝajn okulojn?
- 7 Ĉu vi estas profesoro de Esperanto?
- 8 Ĉu vi havas aviadilon ĉe vi?
  
- 9 Ĉu nia kurso komenciĝis antaŭ du minutoj?
- 10 Ĉu nia kurso finiĝos post unu minuto?
- 11 Ĉu vi laboras dimanĉe?
- 12 Ĉu vi naskiĝis en 1991?
  
- 13 Ĉu tio estas ŝia?
- 14 Ĉu tiu libro estas de via amikino?
- 15 Ĉu kato havas kvin krurojn?
- 16 Ĉu estas ducent gelernantoj en nia kurso?
  
- 17 Ĉu nia leciono daŭras 30 minutojn?
- 18 Ĉu Mipi parolas Esperante?
- 19 Ĉu birdoj flugas per la piedoj?
- 20 Ĉu Ramono skribas per skribmaŝino?
  
- 21 Ĉu oni lernas Esperanton malrapide?
- 22 Ĉu vi estas Elizabeta?
- 23 Ĉu la gelernantoj apud vi estas Adamo kaj Eva?
- 24 Ĉu vi konas Elizabetan?
  
- 25 Ĉu vi konas la gesinjorojn tie?
- 26 Ĉu vi venas al la kurso de Esperanto, ĉar vi deziras lerni la anglan lingvon?
- 27 Ĉu vi lernas Esperanton rapide, ĉar Esperanto havas komplikan gramatikon?
- 28 Bonvolu ripeti la liston, senorde, se vi povas.


Vi lernos, kaj praktikos

I => N


io	nenio
ie	nenie
iu	neniu
ies	nenies
iom	neniom
iam	neniam

- 1 Ĉu estas io sur la tablo en ĉambro A?
- 2 Ĉu estas io sur la tablo en ĉambro B?
- 3 Kio estas tio sur la tablo en ĉambro A?
- 4 Ĉu estas iu en ĉambro A?
  
- 5 Ĉu estas iu en ĉambro B?
- 6 Kiu tiu estas en ĉambro A?
- 7 Ĉu ie en ĉambro A estas araneo?
- 8 Ĉu ie en ĉambro B estas araneo?
  
- 9 Kie estas tiu araneo?
- 10 Ĉu estas iom da vino en la botelo kiu estas en ĉambro A?
- 11 Ĉu estas iom da vino en la botelo kiu estas sub la tablo en ĉambro B?
- 12 Ĉu estas io sur la lampo kiu troviĝas en ĉambro A?
  
- 13 Ĉu ies vizaĝo estas sur la bildo kiu estas en ĉambro A?
- 14 Ĉu ies vizaĝo estas sur la bildo kiu troviĝas en ĉambro B?
- 15 Ĉu estas io sur la maldekstra seĝo en ĉambro B?
- 16 Ĉu sidas iu sur la maldekstra seĝo en ĉambro B?
  
- 17 Ĉu estas io sur la tabloj en la ĉambroj?
- 18 Ĉu estas iu en la ĉambroj?
- 19 Diru al mi, ĉu estas ies vizaĝo sur la bildoj.
- 20 Ĉu estas iu sur la seĝoj kiuj estas en ĉambro A?
  
- 21 Ĉu estas iom da vino en la boteloj?
- 22 Bonvolu diri al mi, ĉu ie en la ĉambroj estas araneoj.
- 23 Ĉu vi iam estis en Parizo?
- 24 Ĉu vi havas ion en viaj manoj?
  
- 25 Ĉu vi iam vizitis la muzeon de Prado en Madrido?
- 26 Ĉu ie en nia klasĉambro estas cindrujo?
- 27 Ĉu estas iu dekstre kaj maldekstre de vi?
- 28 Bonvolu diri al mi, ĉu vi havas iom da mono, kiun vi povas doni al mi.

Ôambro B



Ôambro A



---

Vi lernos, kaj praktikos

Dialogetoj

---

- 1 -Ĉu vi deziras trinki kafon kun mi en la trinkejo nun?  
-Volonte. Atendu momenton. Mi devas iri al la necesejo. Mi tuj revenos.
- 2 -Ĉu ni iru al la restoracio por manĝi?  
-Ne eblas al mi. Mi ne havas monon, eĉ ne unu frankon!  
-Ne gravas. Pagos mi ĉi foje.
- 3 -Pardonu mian malfruan alvenon.  
-Ne gravas. Ni ĵus komencis la kunvenon.
- 4 -Li estus bona prezidento.  
-Vi ŝercas. Male, li estus la plej malbona en la historio de nia lando!
- 5 -Ĉu vi ĉeestos la esperantan prelegon morgaŭ?  
-Eble. Tio dependas. Mi ankoraŭ ne scias. Mi devas rigardi mian horaron. Atendu momenton.
- 6 -Mi opinias, ke ni devas preni la trajnon.  
-Miaopinie, la buso estus pli bona.  
-Laŭ mi, la avadilo estus pli bona, ĉar pli rapida.  
-Mi konsentas kun Paŭlo. Ni prenu la trajnon.  
-Mi tute ne konsentas kun vi! Ni ne povas preni la trajnon. Ĝi ne iras al tiu urbo! Nek, kompreneble, la aviadilo.  
-Do, ni uzu la buson!  
-Konsentite!
- 7 -Ĉu al vi plaĉas tiuj ŝuoj?  
-Tro longaj  
-Kaj tiuj?  
-Ne sufiĉe larĝaj.  
-Nu, tiuj?  
-Perfektaj. Nek tro longaj, nek tro mallarĝaj. Ili estas ĝustaj! Mi aĉetos ilin.

Vi lernos, kaj praktikos

SI, SIN, PREP + SI

Mi	lavas	min.
Vi	lavas	vin.
Li	lavas	sin.
Ŝi	lavas	sin.
Ĝi	lavas	sin.
Ni	lavas	nin.
Vi	lavas	vin.
Ili	lavas	sin.

- 1 Li lavas sin. (Pablo lavas Pablon.)  
Li lavas lin. (Pablo lavas la filon.)
- 2 Ŝi kombas sian hararon. (Maria kombas la hararon de Maria.)  
Ŝi kombas ŝian hararon. (Maria kombas la hararon de la filino.)
- 3 Ŝi banis sin en varma akvo. (Maria estis en la banujo, kaj ŝi estis sola.)  
Ŝi banis ŝin en varma akvo. (Maria lavis kaj banis la bebon.)
- 4 Li razas sin kutime per elektra razilo je la sepa matene.  
La barbiero razas lin per tre akra razilo.
- 5 Post la manĝoj la geknaboj devas brosi al si la dentojn.  
La dentisto brosis al ili la dentojn per speciala broso.
- 6 Post la longa promenado, li bezonis purigi siajn ŝuojn.  
La ŝuciristo poluris liajn ŝuojn per tuko.
- 7 Ŝi povis vidi lin kaj ŝin kaj sin en la spegulo.  
Ŝi vidas sin en la spegulo. (Estas unu persono.)  
Ŝi vidas ŝin en la spegulo. (Estas du personoj.)
- 8 Je la sesa kaj duono matene, Elizabeta levas sin. (ne, ŝin!)
- 9 La futbalisto ĉiam celas helpi sian teamon. (ne lian aŭ ilian!)
- 10 La boksisto batis lin tre forte. (ne, sin!!)

---

Vi lernos, kaj praktikos

SI, SIN, SIA(J)(N), PREP + SI

---

- 1 Estas la sepa matene. Pablo estas en la banĉambro. Li havas sapon en la mano. Kion li faras? (lavi, bani, sapumi)
- 2 Maria havas kombilon en la mano. Ŝia filino estas antaŭ ŝi. Kion Maria faras? (kombi, helpi)
- 3 Maria estas antaŭ spegulo. Ŝi havas kombilon en la mano. Ŝi estas tute sola. Ŝi faras ion. Kion faras ŝi? (kombi)
- 4 En la mano de Aŭturo estas razilo. Sur la vizaĝo de li estas iom da blanka ŝaŭmo. Li movas la manon tien kaj reen. Diru al mi, kion Aŭturo faras nun. (razi, senharigi vizaĝon)
- 5 Estis la sesa matene. Pablo estis en la lito. Nun estas la sesa kaj kvin minutoj, kaj li staras. Kion li faris intertempe? (levi)
- 6 Maria rigardas Paŭlon. Paŭlo rigardas ŝin. Kion ili faras? (rigardi, vidi)
- 7 Li havas tranĉilon en la mano. Antaŭ li estas tranĉitaj cepoj. Kion li faras? (tranĉi, prepari)
- 8 Lia fingro sangas iomete. Estas iom da gutoj da sango sur la tablo. Kion li faris? (tranĉi, vundi)
- 9 Ŝi piediris sur la vojo. Estis multe da polvo sur la vojo. Ŝiaj ŝuoj nun estas malpuraj. Kion ŝi faros? (purigi, ciri, senpolvigi)
- 10 La dentisto havas specialan broson en la mano. Estas knabo, kiu estas en seĝo antaŭ la dentisto. Kion faras la dentisto? (brosi, purigi)
- 11 Maria estas antaŭ spegulo. Ŝiaj gefiloj staras malantaŭ ŝi. Kion ŝi faras? (vidi, rigardi)

---

Vi lernos, kaj praktikos

Prepozicio + kio, kiu, kiuj

- 
- 1 En kio estas la bluaj floroj?
  - 2 Sur kio estas la telefono?
  - 3 Inter kio estas la kulero?
  - 4 Ĉirkaŭ kio flugas la muŝoj?
  
  - 5 Kun kiu parolas Mipi?
  - 6 Pri kio pensas la sciencisto?
  - 7 Sub kio vi sidas nun?
  - 8 Kun kiuj la instruisto parolas en la kurso de Esperanto?
  
  - 9 Per kio oni skribas?
  - 10 Per kio Sinjoro Nopo mortigis la muŝojn?
  - 11 Ĉu vi scias, al kiuj mi sendis leterojn en la pasinta jaro?
  - 12 Diru al mi, al kiuj nia instruisto disdonas la ekzamenetojn.
  
  - 13 Ĉu vi rememoras, pri kio la instruisto parolis en la lasta leciono?
  - 14 Kun kiuj vi tagmanĝis hieraŭ?
  - 15 Ĉu vi povas diri al mi, per kio oni aŭdas, kaj per kio oni vidas?
  - 16 Ĉu vi ankaŭ povas diri al mi, per kio oni flaras, kaj per kio oni gustumas?
  
  - 17 Ĉu vi scias, kun kio la Britoj trinkas teon?
  - 18 Pro kio vi lernas la internacian lingvon Esperanto?
  - 19 Sur kio vi sidas? Sur seĝo? Sur benko?
  - 20 Dekstre de kio vi estas nun?
  
  - 21 Pro kio la ebrulo malbone fartas?
  - 22 El kio estas libroj kaj ĵurnaloj?
  - 23 Diru al mi, sen kio oni ne povas vivi.
  - 24 En kion metis Johano la sukeron?
  
  - 25 Maldekstre de kiu estas la sciencisto?
  - 26 Ĉu vi vidas, antaŭ kio estas tiuj arboj?
  - 27 Apud kiu aŭ apud kiuj vi estas nun?
  - 28 Bonvolu diri al mi, por kiuj instruas nia instruisto Esperanton?

---

Vi lernos, kaj praktikos

por, por fari tion

---

- 1 Ĉu vi ĉeestas nian kurson de Esperanto por lerni la anglan lingvon?
- 2 Ĉu Pablo iris al la poŝtoŝicejo por aĉeti pomojn, pirojn, kaj bananojn?
- 3 Ĉu li iris al la panvendejo por aĉeti lakton kaj fromaĝon?
- 4 Ĉu Sinjoro Nopo prenis sian muŝbatilon por frapi kaj bati sian katon?
  
- 5 Ĉu por paroli france vi venas al nia kurso de Esperanto?
- 6 Ĉu Elizabeta kaj Ramono promenis en la muzeo por vidi leonojn, simiojn, ĝirafojn, kaj ursojn?
- 7 Ĉu Petro vizitis la bestĝardenon por vidi la pentraĵojn de Pikaso?
- 8 Ĉu li estis ĉe la hartondisto nur por paroli kaj babili kun li?
  
- 9 Por kion fari vi ĉeestas la kurson de la internacia lingvo Esperanto?
- 10 Por fari kion Sinjoro Nopo prenis la muŝbatilon?
- 11 Ĉu ŝi kaj ŝiaj amikinoj promenis en la parko por labori?
- 12 Ĉu vi pensas, ke Pako trinkis du fortajn tasojn da kafo por dormi?
  
- 13 Oni uzas okulvitrojn por aŭdi pli bone, ĉu ne?
- 14 Ĉu la personoj, kiuj iris al la restoracio, faris tion por rigardi filmojn?
- 15 Por kio Pablo iris al la poŝtoŝicejo?
- 16 Ĉu la kelnero de la restoracio prenis korktirilon por malŝtopi botelon de lakto?
  
- 17 Ĉu Marko, Mariaj, kaj iliaj geamikoj iris al kinejo por aŭskulti muzikon?
- 18 Bonvolu klarigi al mi, por kio vi estas ĉi tie hodiaŭ.
- 19 Diru al mi, por kio multe da Germanoj iras al la plaĝoj de Hispanio dum siaj ferioj: por skii en la neĝo, por ĉasi bestojn, por labori multe, por sunumi sin, aŭ por studi matematikon.
- 20 Vi kaj viaj geamikoj vojaĝis al la montaro de Svislando por naĝi, ĉu ne?



Vi lernos, kaj praktikos

Komparaciojn

	1	2	3
A > B, A < B	A => (MAL)PLI	+ A(J)	+ OL
	E => (MAL)PLI	+ E	+ OL
	O => (MAL)PLI DA	+ O(J)	+ OL
A = B	A => TIEL	+ A(J)	+ KIEL
	E => TIEL	+ E	+ KIEL
	O => TIOM DA	+ O(J)	+ KIOM

A > B, A < B Ekzemploj:	1	Monto estas <u>pli alta ol</u> monteto.
	2	Elefantoj estas <u>pli grandaj ol</u> leonoj.
	3	Birdo flugas <u>pli rapide ol</u> insekto.
	4	Insekto flugas <u>malpli rapide ol</u> birdo.
	5	Estas <u>pli da personoj</u> en Ĉinio <u>ol</u> en Japanio.
	6	Estas <u>malpli da personoj</u> en Japanio <u>ol</u> en Ĉinio.


A = B Ekzemploj:	1	Ŝi estas <u>tiel alta kiel</u> li.
	2	Miaj gefiloj estas <u>tiel aĝaj kiel</u> viaj.
	3	Johano povas kuri <u>tiel rapide kiel</u> Pablo.
	4	Limako rampas <u>tiel malrapide kiel</u> heliko.
	5	Mi havas <u>tiom da moneroj kiom</u> vi.
	6	Estas <u>tiom da personoj</u> en Parizo <u>kiom</u> en Londono.

Ankaŭ  
la plej rapida  
la malplej granda  
la plej altaj

La plej longa rivero en Usono estas la Misisipo.  
Kiu estas la plej bonaj lernantoj aŭ lernantinoj en nia kurso?

Vi lernos, kaj praktikos

pli ol  
tiel, kiel



- 1 Ĉu Marko estas pli alta ol Ana?
- 2 Ĉu Marko estas pli alta ol Paŭlo?
- 3 Ĉu Ramono estas pli alta aŭ malpli alta ol Maria?
- 4 Ĉu Maria kaj Ramono estas pli altaj ol Marko kaj Ana?
- 5 Kiu estas malpli alta ol Marko?
- 6 Kiu estas malpli alta ol Ana?
- 7 Ĉu vi pensas, ke Paŭlo estas multe pli alta ol Miko?
- 8 Ĉu Paŭlo estas tiel alta kiel Miko?
- 9 Ĉu vi kredas, ke Paŭlo kaj Miko estas tiel altaj kiel Maria?
- 10 El la tuta familio, kiu estas la plej alta?
- 11 Donu al mi la nomon de la persono, kiu estas la plej malalta el la tuta familio.
- 12 Ĉu Marko havas pli da haroj ol Ana?
- 13 Ĉu Marko havas pli da haroj ol Maria?
- 14 Ĉu Marko havas pli da haroj ol Maria kaj Ana?
- 15 Ĉu Paŭlo havas tiom da haroj kiom Marko?
- 16 Ĉu Marko havas tiom da haroj kiom Paŭlo kaj Maria?
- 17 Kiu estas la plej kalva el la familio?
- 18 Bonvolu doni al mi la nomon de la familiano, kiu estas la plej harhava.
- 19 Ĉu la piedoj de la patro estas tiel longaj kiel tiuj (piedoj) de la patrino?
- 20 Kies kapo estas la plej granda?
- 21 Kies piedoj estas la plej longaj?

- 22 Ĉu vi scias, kies kapo estas la plej malgranda?  
 23 Kiu havas la plej longajn piedojn?  
 24 Kiu havas la plej longajn harojn?  
 25 Ĉu la kapoj de la gefiloj estas tiel grandaj kiel tiu (kapo) de la patro?
- 26 Ĉu vi estas tiel alta kiel nia instruisto de Esperanto?  
 27 Ĉu via naskiĝurbo estas tiel granda kiel Novjorko?  
 28 Ĉu loĝas pli malpli tiom da personoj en Parizo kiom en Londono ?  
 29 Ĉu kafo kun sukero estas pli dolĉa ol kafo sen sukero?
- 30 Ĉu vi ŝatas trinki kafon pli ol teon?  
 31 Ĉu vi parolas Esperanton tiel rapide kiel via instruisto?  
 32 Ĉu vi parolas Esperanton pli bone nun ol antaŭ iom da tagoj?  
 33 Ĉu vi pensas, ke Mikelo Jackson kantas pli bone ol aliaj kantistoj?
- 34 Ĉu bileto de aŭtobuso kostas tiom, kiom bileto de aviadilo?  
 35 Kiel nomiĝas la plej alta konstruaĵo en ĉi tiu urbo?  
 36 Diru al mi, kiel nomiĝas la plej longa rivero en via lando.  
 37 Kiu estas la plej aĝa en via familio?
- 38 Kiuj estas la plej junaj en nia kurso de Esperanto?  
 39 Ĉu vi scias tiom pri Esperanto, kiom nia instruisto?  
 40 Ĉu estas pli varme dum julio en Germanio aŭ Italio?  
 41 Kiam vi estas pli laca? Antaŭ la laboro aŭ post ĝi?
- 42 Je kioma horo vi estas pli laborema? Je la naŭa matene, aŭ je la naŭa vespere?  
 43 Kies hararo estas pli longa? Via, aŭ mia?  
 44 Ĉu vi scias, kio estas pli peza? Ligno aŭ kotono?  
 45 Ĉu vi povas diri al mi, kiel nomiĝas la plej longa rivero en Eŭropo?

---

Vi lernos, kaj praktikos

Se mi estus, mi . . .

Ĉu vi vojaĝus ĉirkaŭ la mondo se vi gajnus la loterion?

- 1 vojaĝi ĉirkaŭ la mondo
- 2 aĉeti novan loĝejon kaj translokiĝi
- 3 aĉeti botelon da ĉampano por celebri
- 4 ĉiam vojaĝi unuaklase en trajnoj kaj aviadiloj
- 5 ne plu labori
- 6 disdoni multe da mono al familianoj
- 7 esti tre feliĉa
- 8 doni la duonon de la mono, kiun vi gajnus, al mi

Kion vi farus se vi estus la urbestro (aŭ urbestrino)?

- 9 konstrui centrojn por kulturo
- 10 doni pli da mono al la urba orkestro
- 11 plibonigi la trafikon de la urbo
- 12 plilarĝigi la stratojn
- 13 aĉeti multajn librojn por la biblioteko
- 14 malaltigi la prezojn de la busbiletoj
- 15 pligrandigi la parkojn
- 16 limigi la bruon en la urbo

Se vi estus la prezidento, ĉu vi malaltigus la impostojn?

- 17 malaltigi la impostojn
- 18 konstrui pli da domoj kaj loĝejoj
- 19 ne elspezus multe da mono por la armeo
- 20 paroli Esperanton kun prezidentoj de aliaj landoj

Kion vi farus se vi estus multe pli juna?

- 21 multe pli juna
- 22 multe pli maljuna
- 23 instruisto de Esperanto
- 24 la estro de la Unuiĝintaj Nacioj
- 25 Pikaso
- 26 la plej inteligenta persono en la tuta mondo
- 27 birdo

---

Vi lernos, kaj praktikos skribe:

por + i, por, ke + u

---

- 1 La profesoro ŝaltis la lampon por vidi la nigran tabulon pli bone.
  - 2 La profesoro ŝaltis la lampon por, ke la gelernantoj vidu la nigran tabulon pli bone.
- 
- 1 malfermi la pordon
  - 2 ŝlosi la pordon
  - 3 ĉeestis lecionon de Esperanto
  - 4 sendis la gefilojn al la kinejo
  - 5 iri al restoracio
  - 6 iri al la hartondisto
  - 7 lerni Esperanton
  - 8 labori
  - 9 iri al la preĝejo
  - 10 preni la korktirilon
  - 11 doni monon al malriĉulo
  - 12 instrui en la universitato

Vi re praktikos

plaĉas, ŝatas

-AS -US

- |    |                                       |    |  |
|----|---------------------------------------|----|--|
| 1  | kafo kaj teo                          | 25 | esti kapabla paroli japane                     |
| 2  | fruktosuko                            | 26 | koni Aristotelon                               |
| 3  | cidro (pomvino)                       | 27 | neniam mensogi                                 |
| 4  | minerala akvo                         | 28 | posedi luksan kastelon                         |
| 5  | <u>fumaĵita</u> ŝinko                 | 29 | trovi trezoron el oro                          |
| 6  | svisa fromaĝo                         | 30 | legi librojn pri amo                           |
| 7  | salato kun saŭco de vinagro kaj oleo  | 31 | kegludi  |
| 8  | krudaj cepoj                          | 32 | krokodili                                      |
| 9  | manĝi <u>frititajn</u> terpomojn      | 33 | varti bebojn                                   |
| 10 | laktuko                               | 34 | esti kuracisto                                 |
| 11 | frandi <u>dolĉaĵojn</u>               | 35 | <u>iĝi</u> riĉa                                |
| 12 | figoj kaj daktiloj                    | 36 | varbi <u>abonantojn</u> por<br>esperanta revuo |
| 13 | <u>tendumi</u> en la <u>montaro</u>   |    |  |
| 14 | naĝi en la maro                       |    |  |
| 15 | vojaĝi per trajno ( <u>vagonaro</u> ) |    |  |
| 16 | promeni <u>tra</u> la kamparo         |    |  |
| 17 | resti hejme semajnfine                |    |  |
| 18 | paroli la ĉinan lingvon               |    |  |
| 19 | instrui Esperanton en la venonta jaro |    |  |
| 20 | kuŝiĝi frue, kaj leviĝi malfrue       |    |  |
| 21 | kudri, triki, kaj brodi               |    |  |
| 22 | loĝi sur tute trankvila strato        |    |  |
| 23 | esti <u>riĉega</u>                    |    |  |
| 24 | memori la nomojn de ĉiuj              |    |  |

---

Vi lernos kaj praktikos:

OFTECO

---

- 1 Ĉu vi vekigas antaŭ la sepa matene?
- 2 Ĉu vi enlitiĝas post la dekunua vespere?
- 3 Ĉu vi laboras ĉiutage?
- 4 Ĉu vi ĉiam aŭskultas la novaĵojn de la radio?
  
- 5 Ĉu vi trinkas en kafejo aŭ trinkejo?
- 6 Ĉu vi skribas multajn leterojn?
- 7 Kiom ofte vi aŭskultas klasikan muzikon?
- 8 Kiom da fojoj vi ĉeestis nian kurson en la lastaj dek tagoj?
  
- 9 Kiel ofte pluvas en nia urbo?
- 10 Kiom ofte neĝas en Siberio?
- 11 Kiom da fojoj hajlis ĉi tie en la pasinta jaro?
- 12 Kiom ofte la suno brilas en via regiono en somero?
  
- 13 Kiom ofte vi aĉetas ĵurnalon, revuon, kaj libron?
- 14 Kiam vi rigardas filmon hejme, kaj en kinejo?
- 15 Kiom da fojoj oni manĝas tage, semajne, kaj jare pli malpli?
- 16 Ĉu vi scias, kiom da fojoj via koro batas en unu minuto pli malpli?
  
- 17 Ĉu pluvas multe en la dezerto Saharo? la pluvarbaro Amazono? Kaj montaro Alpoj?
- 18 Kiom ofte vi promenas en parko, piediras al supermerkato, kaj kuras tra la urbo?
- 19 Ĉu vi ferias en la montaro ĉiujare, ĉiudujare, ĉiutrijare?
- 20 Kiel ofte vi manĝas bombonojn?
  
- 21 Kiam vi purigas vian loĝejon?
- 22 Kiam la leterportisto metas la leterojn en vian poŝtkeston?
- 23 Kiam okazas Kristnasko kaj Novjaro?
- 24 En la venonta jaro, kiom ofte vi parolos aŭ legos Esperanton?

---

Vi lernos kaj praktikos:

REPASO

---

- 1 Ĉu vi loĝas en la urbo Novjorko?
- 2 Ĉu vi loĝas en apartamento, kiu havas 10 ĉambrojn?
- 3 Ĉu vi estas dudekjara?
- 4 Ĉu vi naskiĝis en la urbo Ĉikago?
  
- 5 Ĉu vi manĝas vegetare?
- 6 Ĉu vi laboris pli ol 50 horojn en la pasinta semajno?
- 7 Ĉu vi pensas, ke Esperanto estas tre malfacila lingvo?
- 8 Ĉu vi kredas, ke mi parolas flue, prononcas ĝuste, kaj bone uzas la gramatikon?
  
- 9 Ĉu vi havas katon aŭ hundon?
- 10 Kiamaniere vi venas al nia kurso de Esperanto?
- 11 Ĉu al vi plaĉus loĝi en la montaro aŭ sur kamparo?
- 12 Ĉu vi memoras, kie vi aĉetis viajn ŝuojn? kaj kiom ili kostis?
  
- 13 Kion ni devas fari por lerni Esperanton?
- 14 Kion vi preferas: kuiri hejme, aŭ manĝi en restoracio?
- 15 Bonvolu diri al mi la nomon de la plej bona restoracio en via kvartalo.
- 16 Diru al mi ankaŭ la nomon de via plej ŝatata manĝaĵo.
  
- 17 Kiom da esperantaj libroj vi posedas nun, kaj kiom en la venonta jaro?
- 18 Kien vi iris post nia lasta leciono de Esperanto?
- 19 Kiel nomiĝas la personoj, kiuj nun sidas apud ni?
- 20 Ĉu vi deziras sendi leterojn al Esperantistoj, kiuj loĝas en fremdaj landoj? Ĉu vi jam faris tion? Aŭ ĉu vi ankoraŭ ne faris tion?
  
- 21 Kia estas Esperanto?
- 22 Kiaj estas la gelernantoj de nia kurso de Esperanto?
- 23 Kial ni lernas multe da Esperanto tre rapide kaj tre bone?
- 24 Laŭ vi, kiu lingvo estas la plej facila el ĉiuj (lingvoj), kaj kiu lingvo estas la plej malfacila?



Vi trarigardos:

Tabelvortoj

<i>ESPERANTAJ TABELVORTOJ</i>						
	K	I	T	NEN	Ĉ	
U	KIU	IU	TIU	NENIU	ĈIU	
O	KIO	IO	TIO	NENIO	ĈIO	
A	KIA	IA	TIA	NENIA	ĈIA	
ES	KIES	IES	TIES	NENIES	ĈIES	
E	KIE	IE	TIE	NENIE	ĈIE	
AM	KIAM	IAM	TIAM	NENIAM	ĈIAM	
EL	KIEL	IEL	TIEL	NENIEL	ĈIEL	
AL	KIAL	IAL	TIAL	NENIAL	ĈIAL	
OM	KIOM	IOM	TIOM	NENIOM	ĈIOM	

---

Vi lernos, kaj praktikos

KIE -- Rilata Pronomo

---

- 1 Kiel nomiĝas la urbo, kie vi naskiĝis?
- 2 Kia estas la supermerkato, kie vi aĉetas manĝaĵojn?
- 3 Kiel nomiĝas la strato, kie vi loĝas?
- 4 Kie estas la urbo, kie viaj gepatroj geedziĝis?
  
- 5 Kio estas la korpoparto, kie sidas la cerbo?
- 6 Kiel la korpoparto nomiĝas, kie okazas la pumpado de la sango?
- 7 Kiel nomiĝas la parto de la korpo, kie oni digestas?
- 8 Kio estas la nomo de la organoj, kie la aero eniras kaj eliras?
  
- 9 Bonvolu doni al mi la nomon de granda urbo, kie oni povas paroli itale.
- 10 Diru la nomojn de du landoj, kie troviĝas multaj montoj.
- 11 Ĉu vi pensas, ke la lando, kie troviĝas la Nilo, estas Germanio?
- 12 Ĉu vi konas parkon, kie oni povas fiŝkapti en lago?
  
- 13 Ĉu vi povas indiki al mi restoracion, kie oni manĝas bone kaj malmultekoste?
- 14 Kie hotelo troviĝas, kie oni dormas bone kaj malmultekoste?
- 15 Kiel nomiĝas la stacidomo, kien mi devas iri por atingi Parizon?
- 16 Kie estas la muzeo, kie pendas la plejparto de la pentraĵoj de Pikaso?
  
- 17 Kiu strato estas, kie troviĝas la plej proksima malsanulejo?
- 18 Ĉu estas al via domo, kien vi iros post la hodiaŭa leciono de Esperanto?
- 19 Ĉu estas de via loĝejo, de kie vi venis por nia leciono hodiaŭ?
- 20 Kie la ĉambro troviĝas, kie vi dormas? Norde? Sude? Oriente? Aŭ okcidente?
  
- 21 Ĉu vi konas la nomon de la urbo, kie la aŭtoro de Esperanto, Zamenhof, vivis kaj mortis?
- 22 Ĉu vi memoras la paĝon, kie estas la demandoj pri Sinjoro Nopo, la muŝbatilo, kaj la muŝoj?
- 23 Kiel nomiĝas la lando, kie okazos la venontaj Olimpikaj Ludoj?
- 24 Kiel nomiĝas la urbo, kie estas la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj?

---

Vi lernos, kaj praktikos

Prepozicio + kiu(j) + o(j)

---

- 1 En kiu botelo estas la ruĝa floro?
- 2 En kiu botelo estas la verda floro?
- 3 Sub kiuj tasoj sidas la blanka kaj nigra kato?
- 4 Super kiu domo flugas la grandaj birdoj?
  
- 5 Malantaŭ kiu domo staras la altaj arboj?
- 6 Dekstre de kiuj tasoj staras Ramono?
- 7 Maldekstre de kiu botelo estas Paŭlo?
- 8 Ĉirkaŭ kiu objekto la muŝoj flugas?
  
- 9 Apud kiuj objektoj troviĝas la glasoj?
- 10 Antaŭ kiu domo staras la malaltaj arboj?
- 11 Sur kiu monto la granda domo estas?
- 12 En kiu mano la muŝbatilo de Sinjoro Nopo estas?
  
- 13 En kiu kurso de Esperanto vi nun estas? BEKUNU aŭ BEKDU?
- 14 En kiu kurso de Esperanto vi baldaŭ estos?
- 15 Pri kiu temo nia instruisto de Esperanto parolis en la lasta leciono?
- 16 Sen kiu aĵo la instruisto ne povas skribi la vortojn de Esperanto?
  
- 17 En kiu urbo vi naskiĝis?
- 18 Sur kiu strato vi nun loĝas, kaj sur kiu antaŭ dek jaroj?
- 19 Bonvolu indiki al mi, en kiu konstruaĵo vi kaj mi estas nun.
- 20 Tra kiuj partoj de la urbo vi iros por iri hejmen post la hodiaŭa leciono?
  
- 21 Ĉu vi povas diri al mi, proksime de kiu urbo okazis la katastrofo de Ĉernobil?
- 22 Ĉu vi scias, tra kiuj landoj oni devas vojaĝi por iri de Hispanio ĝis Polio?
- 23 Diru al mi, en kiu urbo oni trovas la sidlokon de la Unuiĝintaj Nacioj.
- 24 Ĉu vi kapablas diri, tra kiuj landoj fluas la rivero Danubo?

---

Vi lernos, kaj praktikos

$$\boxed{+N} = \boxed{EN + O} = \boxed{+E}$$

---

Ekzemploj	1	<u>Tiun someron</u> Maria vizitis Berlinon.
	2	<u>En tiu somero</u> Maria vizitis Berlinon.
	3	<u>Tiusomere</u> Maria vizitis Berlinon.

---

1 Vintron miaj geonkloj ŝatas skii en la montaro.

⇒

⇒

2 Somere li ferias kun sia familio kutime en la suda parto de Hispanio.

⇒

⇒

3 En septembro francaj geknaboj rekomencas lerni en la lernejoj.

⇒

⇒

4 Ni ne havos lecionon en la venonta merkredo, ĉar ĝi estas festtago.

⇒

⇒

5 Kristanoj iras al preĝejo dimanĉon, Judoj al sinagogo sabaton, kaj Islamanoj al moskeo vendredon.

⇒

⇒

6 Je Kristnasko ni ĉiuj manĝis ĉe niaj geavoj.

⇒

⇒

---

Vi lernos, kaj praktikos

REPASO => TEMPORDO

---

Jen tago en la vivo de Aleksandro, kiu estas studento en la Universitato de Esperanto. Parolu pri lia kutima tago!

- 6:15 vekhorloĝo sonori  
6:16 haltigi la sonorilon de la vekhorloĝo  
6:17 reekdormi  
6:20 vekhorloĝo ree sonori  
6:21 vekigi, ĉi foje, vere  
-- oscedi  
-- streĉi la muskolojn de siaj brakoj  
-- leviĝi (levi sin)  
-- iri en la banejon, duŝi sin, razi sin, vesti sin  
-- prepari sin por la tago  
6:50 matenmanĝi  
-- manĝi panon kun butero kaj konfitaĵo  
-- manĝi pomon kaj oranĝon  
-- trinki teon kun lakto kaj sukero, sed sen citrono  
7:25 malfermi la pordon, fermi ĝin, ŝlosi ĝin, iri ĝis la bushaltejo  
7:30 ekpreni buson, legi dum vojaĝo  
7:50 alveni al Esperanta Universitato  
8:00 iri al kurso pri historio, noti en Esperanto, profesoro paroli Esperanton, klarigi esperante  
9:50 la kurso finiĝi, iri al kafejo kun siaj amikoj, trinki kafon, manĝi kukon, babili esperante, pridiskuti la kreskadon de Esperanto  
10:00 ĉeesti kurson pri filozofio  
11:00 ĉeesti kurson pri la Unuiĝintaj Nacioj

**Kio okazas poste? Elpensu la reston!**

---

Vi lernos, kaj praktikos

PREP + KIU(J)  
Rilata Subpropozicio

---

- 1 Ĉu la botelo, en kiu la verda floro staras, estas ruĝa?
- 2 Ĉu la botelo, en kiu la ruĝa floro staras, estas granda aŭ malgranda?
- 3 Kiel nomiĝas la persono, kun kiu Mipi parolas?
- 4 Kiu estas tiu, kun kiu Maria estas?
  
- 5 Kia estas la skribilo, per kiu Ramono skribas?
- 6 Kiaj estas la tasoj, apud kiuj la telefono sidas?
- 7 Priskribu la tasojn, maldekstre de kiuj la granda kaj blanka kato estas.
- 8 Parolu pri la domoj, super kiuj la grandaj kaj malgrandaj birdoj flugas.
  
- 9 Ĉu la klasĉambro, en kiu ni havas niajn lecionojn, estas sufiĉe granda kaj komforta?
- 10 Ĉu la temoj, pri kiuj nia instruisto parolas, estas interesaj aŭ enuigaj?
- 11 Ĉu la gelernantoj, kun kiuj ni praktikas kaj parolas Esperanton, estas bonaj, belaj, afablaj, kaj inteligentaj?
- 12 Ĉu la parolekzercoj, per kiuj ni praktikas Esperanton, estas utilaj al ni por lerni paroli Esperanton pli bone kaj flue?
  
- 13 Kia estas la loĝejo, en kiu vi loĝas?
- 14 Ĉu la lito, sur kiu vi dormas, estas mola kiel kotono, aŭ malmola kiel ŝtono?
- 15 Kiel nomiĝas la lasta persono, al kiu vi sendis leteron?
- 16 Kiun nomon havas la strato, ĉe kiu vi nun loĝas? Kaj antaŭ dek jaroj?
  
- 17 Kia estis la elementa lernejo, al kiu vi iris antaŭe?
- 18 Kiel nomiĝas la organoj, per kiuj oni vidas, per kiuj oni aŭdas, per kiu oni flaras, kaj per kiu oni gustumas?
- 19 Kiuj landoj estas, tra kiuj fluas la rivero Danubo?
- 20 Bonvolu doni al mi la nomojn de la landoj, tra kiuj oni devas vojaĝi por iri de Hispanio ĝis Polio.

---

Vi lernos, kaj praktikos

BEKDU REPASADO

---

- 1 Kiel nomiĝas la urbego, kiu estas en la centro de Hispanio?
- 2 Kiel nomiĝas la urbegoj, kiuj estas la ĉefurboj de Francio kaj Anglio?
- 3 Ĉu Francio estas pli granda ol Portugalio?
- 4 Ĉu al vi plaĉus vojaĝi al Portugalio en la venonta jaro?
  
- 5 Ĉu vi konas la nomon de la urbo, kie nia instruisto naskiĝis?
- 6 Se vi povas, donu al mi la nomojn de la urboj, kie vi kaj mi loĝis antaŭ kvin jaroj.
- 7 Kia estas via naskiĝurbo, kaj kiom da personoj loĝas tie nun.
- 8 Ĉu al vi plaĉus esti la urbestro de via naskiĝurbo?
  
- 9 Ĉu mi estas pli alta ol vi, aŭ ĉu vi estas pli alta ol mi?
- 10 Kiu estas la plej juna en nia kurso de Esperanto?
- 11 Kiom aĝa tiu persono estas pli malpli?
- 12 Ĉu vi kredas, ke nia instruisto estas tiel inteligenta kiel la sciencisto, kiu havas grandan kapon, kaj kiu pensas multege?
  
- 13 Kion vi pensas: ĉu Sinjoro Nopo unue razis sin, kaj poste duŝis sin, aŭ kontraŭe, ĉi matene?
- 14 Donu al mi la nomon de la lernanto aŭ lernantino, kies hararo la plej longa estas.
- 15 Por fari kion vi venis al nia kurso hodiaŭ?
- 16 Kiel oni ŝlosas pordon? \_\_\_\_\_ .
  
- 17 Ĉu estas io ruĝa ĉe la plafono?
- 18 Cu vi povas diri al mi, per kio oni vidas, kaj per kio oni aŭdas?
- 19 Pro kio vi faras la Kurson BEKDU?
- 20 Kion vi farus, se vi estus riĉa?
  
- 21 Kion vi pensas pri Esperantistoj, al kiuj plaĉas krokodili la tutan tagon, kaj la tutan nokton ĉiutage?
- 22 Kiom ofte vi aĉetas ĵurnalon, revuon, kaj libron?
- 23 Kien vi vojaĝos dum la ferioj venontan jaron?
- 24 Johanino vekigis ĵaŭdon je la sepa. Kion ŝi faris poste? Kaj post tio?